

Okdek jaroj de esperanta vivo, 6-a parto
Eksvolapükistoj esperantiĝintaj
Claude Gacond, 184-a radioprelego, 1967.04.19 & 1967.04.22

Cl.- Atentu esperantistoj! Ĉi tie vi aŭdas la Svisan Kurtundan Radiostacion. Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

En 1887 Ludoviko Lazaro Zamenhof dissendis sian broŝuron *Lingvo internacia de Doktoro Esperanto* al multaj adeptoj de la lingvo Volapük kreita de prelato Johann Martin Schleyer en 1879.

A.- Li antaŭvidis, ke komparo inter ambaŭ lingvoj estos bato al la ĵargono de la germana prelato. Sed li estis konvinkita pri la eduka rolo de Volapük. En la volapukistaj kluboj dum ses jaroj oni entuziasmiĝis pri lingvo, kiu strukture ne estis internacia. Jen alvenas vere internacia lingvo. Tiu entuziasmo trovos fine realan agadkampon.

Cl.- Zamenhof ne eraris. Volapük disvastigis ne nur falsajn ideojn pri la karaktero de lingvo internacia. Ĝi komprenigis la socian neceson de tia lingvo.

A.- Ni diru hodiaŭ kelkajn vortojn pri la ĉefaj esperanto-pioniroj, kiuj estis varbitaj en la volapukistaj medioj.

Cl.- La *Unua Libro* en 1888 eniris la leterujon de Leopold Einstein. Tiu germana volapukisto estis konata pro sia en 1885 eldonita *Historio pri la mondlingvaj provoj ekde Leibniz ĝis Schleyer*.

A.- Leopold Einstein tuj entuziasmiĝis por la *Lingvo internacia*, kaj tion li sciigis en tuta Germanio. Tiu varbado por la nova lingvo atingis Christian Schmidt, la prezidanto de la volapukista klubo en Nürnberg, kaj la tuta Mondlingva Klubo tendencis pli malpli forlasi la lingvon de Schleyer favore al tiu de Zamenhof. Tio estis skandalo en la volapuka mondo. En la naskiĝanta esperanta mondo tio estis fonto al entuziasmo.

Cl.- Rezulto : En decembro 1888 estis kreita la unua esperantista grupo kaj ties prezidanto Christian Schmidt fariĝis la postan jaron la redaktoro de la unua esperantista gazeto. Fine unu revo de Zamenhof realiĝas. La esperantistaro havas monatan organon.

A.- Alia eksvolapukisto ludis gravan pioniran rolon en la esperanto-movado. Estas Edgar von Wahl, kiu konsilis al Zamenhof plibonigon de la korelativoj por eviti konfuzon inter la tempa serio, kiu finiĝis per *ian* kaj la adjektiva serio *ia* en la akuzativa formo. Tiu baltgermana matematikisto estas unu el la fondintoj de la esperantista grupo Espero en Petrograd. En la dua jaro de la esperanta erao li eldonas esperanto-hispanan vortareton kaj en 1896 tradukas el la rusa la rakonton *Princino Mary* de Lermontov.

Cl.- Edgar von Wahl reprezentos la reformistan tendencon. Post la voĉdono en 1894 rifuzinta ŝanĝojn en esperanto li forlasos iom post iom la lingvon de Zamenhof por labori al la verkado de alia lingvo, kiun li diskonigos sub la nomo **Occidental** en 1922 fondante la revuon *Kosmoglott*.

A.- Antoni Grabowski estas verŝajne la plej lerta volapukisto, kiu interesiĝis pri esperanto. Li vizitis Johann Martin Schleyer en Konstanz kaj konstatis, ke parole la aŭtoro de Volapük ne plene estras sian lingvon.

Cl.- Tiu pola inĝeniero tuj entuziasmiĝis por la nova lingvo kaj ektradukis el la rusa la rakonton de Puŝkin *La Neĝa Blovado*. Tiu verketo aperis kun aliaj tradukoj en ekzercaro titolita *Kondukanto internacia de l' interparolado*.

A.- Agrablaj skeĉoj alportis interparolan nutraĵon por la grupa vivo. Antoni Grabowski, la unua persono kun kiu Zamenhof povis konversacii en esperanto, volis, ke la esperantistoj lernu paroli rekte en la lingvo internacia.

Okdek jaroj de esperanta vivo, 6-a parto
Eksvolapükistoj esperantiĝintaj
Claude Gacond, 184-a radioprelego, 1967.04.19 & 1967.04.22

Cl.- En la antaŭparolo al tiu verketo li anoncas, ke tiu libreto estas por li unua paŝo en la esperanta verkado. Li plenumos sian promeson. La esperanta tradukliteraturo ŝuldas al li la elpoliĝon de la ĉefverko de Adam Mickiewicz *Sinjoro Tadeo*.

A.- Antoni Grabowski estis eksterordinara poligloto, kiu kapablis legi en proksimume tridek lingvoj. Li amuziĝis traduki por poemaro titolita *El Parnaso de Popoloj* verkojn apartenantajn al 29 diversaj lingvoj. Ni citu ilin :

Cl.- Ili estas la lingvoj angla, bohema, bulgara, dana, finna, flandra, franca, germana, antikva-greka aŭ helena, nov-greka, hispana, hungara, itala, japana, kartvela, kataluna, latina, litova, luzica, pola, pola-kaŝuba, portugala, provenca, rumana, rusa, serbo-kroata, slovena, sveda kaj ukraina.

A.- Estas impona listo, kiu donas ideon pri la pasio de tiu pola inĝeniero, kiu ankaŭ estis konata pro tradukoj de sciencaj verkoj el la angla polen.

Cl.- Grabowski metis sian pasion por la studo de fremdaj lingvoj je la servo de esperanto. Kaj li faris tion kun granda talento kaj granda lingva respekto.

A.- En la komenco li provis kontentiĝi pri naŭcent-radika lingvo. Sed poezia lingvo estas ĝenerale riĉa lingvo. Grabowski estas unu el la esperantistoj, kiu plej multe forĝis neologismojn post Zamenhof.

Cl.- Sed la esperantisteco de Grabowski konis krizan periodon. Kun Edgar von Wahl kaj aliaj pioniroj de la unua epoko li pensis, ke la malrapida progreso de la disvolviĝo de esperanto estis kaŭzata de lingvaj mankoj. Pro tio lia reformemo en la jaroj 1892-1994-aj.

A.- En verko titolita *Liro de la esperantistoj* eldonita en 1893 li sisteme uzas *ed* anstataŭ *kaj*, *lo* por *ĝi*, kaj *hodiaŭ*, *ankoraŭ*, *preskaŭ*, *baldaŭ*, *ambaŭ*, *kvazaŭ*, *ĉirkaŭ* kaj *antaŭ* fariĝas *hodge*, *ankore*, *preske*, *balde*, *ambe*, *kvaze*, *ĉirkae* kaj *ante*.

Cl.- Multaj aliaj radikoj estas ŝanĝitaj ĝis nereconebleco. Sed la postan jaron Antoni Grabowski rifuzis la ŝanĝojn en la lingvo en la voĉdono pri reformo. Ĉu li subite revenis al la lingvo de la *Unua Libro* ?

A.- Ne ! En 1896 en la gazeto *Linguist* li prezentas lingvo-projekton, kiu estas bazita sur la franca. Tiu artikolo fakte anoncas la ido-skismon.

Cl.- Sed iom post iom Antoni Grabowski komprenis, ke lia sinteno estis subjektiva. Tiu reformemo de lingvo kapablas fidele traduki plej diversajn literaturaĵojn, estas fakte manko de lingva sento.

A.- De tiu momento, ekde la komenco de la dudeka jarcento, Antoni Grabowski ĉesos amatori per kreo de lingvo-projektoj, por dediĉi sian talenton al la traduk-arto kaj riĉigi la esperantan literaturon.

Cl.- Nur per senĉesa verkado kaj parolado oni fine komprenas la spiriton de lingvo. Dum Edgar von Wahl definitive forlasis esperanton, Antoni Grabowski definitive forlasis la vanajn prilingvaj disputojn. En la **Unua Universala Kongreso** li estas inter la plej entuziasmaj defendantoj de la fundamenta lingvo.

A.- Kaj kiam Vaillant asertos en sia antaŭparolo al *Elektitaj fabloj* el La Fontaine, ke ne estas eble verse traduki la fablojn de La Fontaine, ĉar en esperanto rimas nur samkategoriaj vortoj, Antoni Grabowski prenos la defendon de l' rimo verkante sian faman poemon *Sur unu kordo*, kiu rimigas nur vortoj apartenantajn al diversaj gramatikaj kategorioj. Ni citu kvar versojn :

Okdek jaroj de esperanta vivo, 6-a parto
Ekvolapükistoj esperantiĝintaj
Claude Gacond, 184-a radioprelego, 1967.04.19 & 1967.04.22

Cl.- *Sur lir' dukorda, diris oni,
Ne eblas rima son' kaj jen
Pro tio devas takt-bastoni
Antikvajn ritmojn Lafontaine.*

A.- Tiu eksterordinara poemo, kiu kritikas la troan uzon de samsufiksaj rimoj en la esperanta poezio, vipis la talentojn kaj signifas por nia poezio ekmaturiĝon.

Cl.- Vi aŭdis prelegon el Svislando. Parolis Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo !

-oOo-